

AMERICAN ESPERANTIST

No. 2 Vol. 56.

AMERIKA ESPERANTISTO

LA MONATA BULTENO DE LA ESPERANTA-ASOCIO DE NORDA AMERIKO

Joseph Leahy, General Secretary

Central Office 1410 H Street, N-W Washington, D.C. Central Office
J.R. Scherer, Pres. Los Angeles, Calif. -- E.G. Dodge, Ch. Exec. Comm. Wash. D.C.

AGRABLAJN KRISTNASKAJN FESTO-TAGON kaj FELICAN NOVJARON NI DEZIRAS A CIUJ AMIKOJ.

BOMBOJ AŬ ESPERANTO ?



Se la britaj, germanaj, rusaj kaj aliaj eŭropaj virinoj kiuj devas tra-vivi multajn noktojn en bomb-sekuraj keloj, povus nun elekti inter bomboj kaj studado de Esperanto, nia neŭtrala lingvo estus tuj lernata de centmiliono da novaj samideaninoj.

Sed nun estas tro malfrue por eviti la nunajn bombojn. Dum 20 jaroj ne-intereso inter la granda homamaso estis la ĉefa kaŭzo de la ne pli rapida progreso de Esperanto. Se nur 25% de ĉiuj homoj en ĉiu eŭropa lando estus lernintaj nian lingvon ne estus nun homa buĉado, ne estus nun rompitaĵoj, ne estus nun blinduloj, ne estus nun rompitaĵoj koroj pro disigo de tutaj familioj, ne estus nun tiom da detruitaj domoj kaj tiom da infanoj mortantaj en la brakoj de patrinoj.

Dum 20 jaroj, de la fino de la lasta mondmilito ĝis la komenco de la nova mondmilito, la homoj havis tempon por lerni Esperanton. Sed ili preferis senutile babiladi en virinaj kluboj, ludi kartojn en trinkejoj, amuzi sin en ĉiu libera vespero, anstataŭ uzi 10% de sia libera tempo por lerni ion kio tre multe progresigus la homaron. Per la scio de Esperanto inter cent milionoj da homoj, ili estus korespondintaj inter si; ili estus devigintaj siajn registarojn helpi al najbaraj landoj kie regis terura mizero.

Jes, ekonomiaj cirkonstancoj kaŭzas militojn, sed nur per ĝenerala kono de Esperanto inter ĉiuj inteligentaj homoj, tiuj ekonomiaj cirkonstancoj povas esti solvataj. Dip-lomatoj kiuj iras al konferencoj tre ofte estas malhonestaj iloj de malhonestaj ŝtatestroj. Nur se la granda homaro povas paroli kaj korespondi rekte inter si, ili povas honestigi siajn diplomatojn. La mizera situacio en Munĥeno, kie kvar estroj de kvar grandaj landoj ne povis paroli inter si sen la helpo de danĝera tradukado, estas honto por la homa inteligento. La vortoj en ĉiuj naciaj lingvoj estas tro diverssignifaj, kaj per tradukado oni povas nur komplikigi la konferencojn. La vivo de centmiloj da homoj estis riskata per danĝera tradukado de danĝere diverssignifaj vortoj el la buŝoj de malhonestaj ŝtatestroj.

Esperanto estas lingvo tre klara, tre simpla kaj tamen tute taŭga por honestaj diplomatoj. Per la kono de Esperanto la tuta homaro inteligenta povus kontroli la konferencojn, kaj devigi siajn registarojn amike solvi la internaciajn ekonomiajn problemojn. Ni Esperantistoj havas la gravan taskon nun vivteni nian belan kaj tre klaran neŭtralan lingvon kaj ree prezenti ĝin al la postmilita homaro. Ni esperu ke miliono da homoj lernos Esperanton por eviti trian mondmiliton per la amika deziro kompreni unu la alian kaj komprenante solvi la ekonomiajn problemojn. Ni esperu ke ili konstatos ke Esperanto estas pli dezirinda ol bomboj, pli bela ol keloj, pli feliĝiga ol rompitaĵoj kaj koroj. Esperanto certe venkos. La homaro ne plu povas multe progressi sen la grandskala uzo de neŭtrala lingvo. Esperanto venkos kontraŭ la homa morala malboneco kaj sen-intereso, same kiel venkis la Gutenberga presmaŝino kontraŭ la homa malklereco. Sed ni Esperantistoj devas vivteni nian lingvon por ke ĝi ne pereu dum la nuna plej terura uragano. Ni ne forlasos la ŝipon !



Joseph R. Scherer
Prezidanto de E.A.N.A.

Rio de Janeiro, la 8-an de Okt., 1941.

Kara Samideano kaj Kolego:

Kun plezuro mi legas vian afablan leteron de la 29/9 kaj la belan poezion, kiun mi resendas al vi.

La unua atako kontraŭ Esperanto jam atingis nin kaj ni jam kontraŭatakis la nevideblan malamikon. En la Bulteno de Rotary International de la 8/8 venis artikolo "promesante la solvon de la problemo de lingvo internacia." Tiu artikolo estas ruza, eĉ ne menciis la nomon de Esperanto, sed deklaras, ke oni prezentos lingvon perfektan, ekstraktitan el la okcidentaj lingvoj. Ĝia celo estas malkuraĝigi la propagandistojn de Esperanto. Ni povas facile antaŭvidi la duan artikolon. En ĝi oni certe mencias, ke estis multaj projektoj, sed ili ĉiuj malsukcesis, ĉar ili ne estis sufiĉe bonaj -- Volapük, Novial, Occidental, Ido, Bolak, Esperanto, -- Ĉiuj malsukcesis! . . . Nun venos la vera solvo!

En diversaj artikoloj por revuoj mi jam antaŭatakas la projekton kun jenaj argumentoj:

1. - Esperanto fariĝis de longe rivero; ĉiuj novaj projektoj alfluas al ĝi kaj helpas ĝin.

2. - Esperanto jam estas uzata en la tuta mondo, ne nur de privataj homoj, sed eĉ de Registaroj kaj oficialaj servoj.

3. - Esperanto jam estas aprobita de la plej altaj instancoj, kia estas nia Brazila Konsilantaro por Edukado.

4. - Esperanto jam posedas riĉan literaturon kaj fariĝis vivanta lingvo kun propra spirito kaj frazaro.

5. - Esperanto venkis, ĉar ĝi naskiĝis en la oportuna momento, antaŭ ol la apero de fonografo, radio, sonfilmoj, tial kiam tiuj transportiloj de la parolo aperis, ili jam trovis en ĉiuj landoj homojn sciantaj la lingvon por uzi ĝin en la novaj kondukiloj.

6. - Esperanto en 32 Universalaj Kongresoj neŭtralaj kaj multaj teknikaj pruvis antaŭ la tuta mondo sian vivon, tial ĝi venkis la publikan opinion kaj nun estas tutmonde agnoskata kiel la lingvo internacia.

TIAL ĉiuj novaj projektoj fariĝas riveretoj alfluantaj al la granda 55-jara rivero.

Ankaŭ en Esperanto mi eldonos broŝurojn pri la temo. Vin samideane salutas via

I.G.BRAGA.

PARABLE OF THE HONEY BEES.

To the left is printed a letter from Ismael Gomes Braga, one of the finest Esperantists of the New World. His metaphor of the rivers which lose themselves in the main stream calls back to mind the story of a young swarm of bees, who thought the "old folks" were old fogeys indeed because they always made the cells in the honey comb six-sided. "Let's try making them square!" They did, and found the walls too weak to stand up. Then eight-sided with solid columns in the corners, but that wasted too much wax. Then circular, but that wasted the wax even worse. Then "crazy quilt" with no two cells alike, and that gave them nervous prostration from too much brain work. So it went on for a long time. The young bees kept on trying one plan after another till everybody forgot what the original shape had been. One bright bee exclaimed, "We've tried everything else, let's make 'em with six sides!" That worked fine, so the young folks, in the pride of their new invention, kept jeering at the old folks.

The case of the bees is not just parallel to that of Esperanto. But there is this much of likeness, that after Esperanto became fully developed in all practical ways, there still have kept arising from time to time persons who point to one feature or another which does not quite accord with their own personal idea of what the international language should be like. And so

they start experimenting with proposals for change. It is not enough for them to look at the record, which clearly displays the fact that Esperanto has proved itself an adequate and practical language for travelers, for commerce, for personal correspondence, for courtship, for children in the nursery, for prose literature, for poetry, for jokes, for international conventions of workers and plain people generally, as well as for international conventions of scientists. Like the six-sided honey comb, Esperanto can stand on its record.

LA ESPERANTISTARO SUDE DE LA LANDLIMO.

Unu el la memoroj de tre agrabla vizito inter niaj sudaj najbaroj, estas la bonveno, kiun akordis al mi la gesamideanoj de Meksiko. Malmultaj ĵe nombroj, ili montras per sia afabla bonvolo kaj kora bonveno ke la lumo de la vera esperanta spirito brilas hele kaj kuraĝe en ilia rondo.

Unu posttagmezon baldaŭ post mia alveno en la bela ĉefurbo de Meksiko, mi serĉis la oficejon de la Tutmonda Instituto de la Nepersona Vivo, kun kies kunlaborado la Esperantistoj de Meksiko organizas sian programon. Tie mi renkontis S-ro Jose Serrano, tre bona Esperantisto, kiu estas unu el la gvidantoj de la movado en Meksiko, kaj kun kiu mi estis korrespondinta de post pluraj jaroj. Li tre afable salutis min, kaj invitis min partopreni malgrandan esperantan ekskurson al la Grotoj de Cacahuamilpa, la venontan dimanĉon. Mi volonte akceptis la inviton, kaj tre frue en la dimanĉa mateno, nia grupeto forlasis la urbon por trapasi la montojn kiuj ĉirkaŭstaras Meksikurbon, kaj komencis malsupreniri laŭ la zigzaga, kruta sed bona ŝoseo kiu kondukas la vojaĝanton tra la tropika regiono ĝis la Pacifika Maro.

En la grupo estis S-ro Eŭgenio Lanti, la fama eŭropa Esperantisto, prezidanto de SAT, kaj tiam enloĝanto de Meksiko, S-ro Serrano, S-ino Lola Calderón kaj S-ro Jesus Silva, ĉiuj Esperantistoj. Kun S-ano Lanti, kies sprita kaj kelkfoje tre pika intelekto multe vigligis la konversacion, ni pridiskutis la estontecon de Esperanto, kaj la rolon kiun devos ludi la Esperantistoj de la Nova Mondo por la konservado de la movado en la nunaj tragedia tempo. Post tre agrabla promeno tra la mirindaj grotoj, serio de pli ol 14 vastaj kavernoj, ĉiuj pli altaj ol 200 futoj, kaj plenaj de mirindaĵoj, stalagmitoj, kaj stalagtitoj, fantaziaj kristalaj kreskaĵoj, ĉiuj lumigitaj per multaj elektrikaj lumoj, kelkfoje koloraj, --hejmenirante ni haltis dum kelka tempo en malgranda indiana vilaĝo, kie ni aĉetis kokosojn, kaj trinkis la akvon rekte el la ŝelo. Ni haltis denove en Cuernavaca, kie en la Palaco de Cortes, la ŝtata domo de la ŝtato de Morelos, ni rigardis la interesajn murpentraĵojn de Diego Rivera, kiuj tiel vive reprezentas la historion de la evoluado de la meksika popolo, de ĝia praa indiana deveno, ĝis la periodo de la "bonaj najbaroj."

Trapasante denove la montojn, ni estis atakitaj per forta kaj brua fulmotondra ŝtormo, sed babilante ĉiam en nia Esperanto, ni preskaŭ ne atentis la grandajn penojn de nia tre kapabla ŝoforo por teni la aŭtomobilon laŭ la ĝusta, kvankam tre kurba vojo.

Dufoje dum mia restado en Meksikurbo, mi estis invitita kune kun mia kolego, Prof. Tomich, kiu estis en Meksiko dum la tuta somero, fari paroladetojn en Esperanto dum la semajna radio-disaŭdigo de la Esperantistoj de Meksiko, per la mallongonda stacio de la T.I. N.V., XEWI, "Mia voĉo al la Mondo de Meksiko," kaj mi transsendis al la tutmonda radio-aŭskultantaro, la saluton de la samideanoj de E.A.N.A.

Unu posttagmezon, S-ro Serrano, Prof. Tomich kaj mi vizitis D-ro Ambrosio Vargas Valencia, prezidento de la Centra Meksika Esperantista Societo, tre afabla, dignoplona samideano, kun kiu ni diskutis la eblecon de pli granda kooperado inter la meksikaj Esperantistoj kaj la usonaj. Ni instigis al li sendi al la kongresoj de E A N A delegaton de la meksika Esperantistaro, kaj li konsentis pri la avantaĝoj de tia kooperado, kvankam la mona problemo estas ja grava. Ni ankaŭ sugestis ke okazu kongresoj de la meksika Esperantistaro, kaj eĉ promesis ke ĉeestus tia kongreso iuj usonaj samideanoj, ĉar vere Meksiko estas vizitinda loko, kaj kredeble estus kelkaj usonaj Esperantistoj kiuj irus tien dum la venonta somero. D-ro Vargas Valencia rakontis pri multaj interesaj spektakloj kiujn li havis dum lia longa esperanta vivo, kaj oni vere devis konsenti ke la kontribuo de niaj sudaj najbaroj al la vivo de Esperanto estis ja granda.

Alia konata meksika samideano estas S-ro Jesus Amaya, tre okupata kaj vigla Esperantisto, kiu redaktas interesan ĵurnaleton esperantlingvan kaj hispanan, "Renovigo." S-ro Amaya, kiu estas sufiĉe fama inter la Esperantistaroj de diversaj latin-amerikaj landoj, diris al mi ke li redaktas la ĵurnaleton kiel respondilon al la multaj korespondantoj kiuj ĉiumonate subakvigas lin sub diluvo de leteroj kaj presaĵoj. Li ankaŭ tre favoris plenan kooperadon kun la Esperantistoj de Usono.

Estante en Meksiko, ĉiu usona samideano devus nepre halti momenton en la oficejo de Western Union, kie laboras S-ro Amaya, kaj li nemiam estos tro okupata por fari bonan samideanan saluton. Tia saluto ankaŭ estos farita de la bonaj samideanoj de T.I.N.V., kies oficejo, 56 Calle de Mina, ankaŭ estas tre proksima al la urbocentro.

Charles E. Simon, Cleveland, Ohio.

E.A.N.A. ANNUAL CONGRESS (1942) WILL BE HELD IN DETROIT, MICHIGAN, 1st week in July!

* * * * *

* SIGNIFO DE L' "NEŬTRALECO." La Internacia Esperanto-Ligo estas tutmonda organizo de l' tiel nomata "neŭtrala Esperanto-movado." Simile la Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko partoprenas, kiel landasocio, en la "neŭtrala Esperanto-movado." La sinteno esprimata per tiu ĉi vorto -- "neŭtrala" -- estas tute inda kaj saĝe alprenita, se oni komprenos ĝin laŭ justa senco. Bedaŭrinde okazas kelkfoje ke oni aŭ miskomprenas aŭ intence misuzas la vorton, kvazaŭ ĝi signifus ke la membroj de tiuj organizoj estus homoj nur "laktoakvecaj," al kiuj mankas seriozaj konvinkoj pri temoj sociekonomiaj, religiaj, ktp. La realo estas tute mala. Ĝenerale oni povus diri ke ju pli fervora estas iu persono kiel Esperantisto, des pli fortaj estos liaj konvinkoj pri aliaj temoj havantaj moralan aŭ scipolitikan aspekton. Sed lia Esperantismo tute ne diktas kia estu lia kredo pri ceteraj (ofte pridisputeblaj) demandoj. Personoj kun tre diversaj vidpunktoj pri ceteraj aĵoj povas (kaj ofte tiel faras) entuziasme interkonsenti pri la unu grava konstato, ke Esperanto estas ja la praktika solvo de l' internacia lingva problemo, kaj ke ties disvastigado grave helpas al homaro per forigo de neneseaj malamikecoj -- la malamikecoj, nome, kies sola aŭ ĉefa radiko estas la neeblo interkomprenigi sin. Estas do tre utile, havi Esperantistajn klubojn kaj asociojn kies agadkampo limigos sin je la sola celo, pri kiu ĉiuj membroj povos interakordiĝi. Iliaj diversecoj pri aliaj temoj estu severe postlasataj en la hejmo, kiam ili kunvenas por la agado de la Esperanto-klubo! En tiu ĉi senco (tute ne en la senco de foresto je fervoraj kredoj alitemaj) la plej ampleksaj kaj universalaj organizoj de Esperantistoj devas resti "neŭtralaĵ." Povas esti -- kaj ja estas -- aliaj organizoj, kiuj nekaŝe uzas Esperanton kiel propagandilon de jena aŭ jena "ismo". La organizoj en la "neŭtrala" (ĝenerala) movado tion ne kritikis. Ili ja bonvenigas ĝian pruvon ke multaj homoj jam uzas Esperanton, por celoj diversaj kiuj estas al ili karaj. Sed membroj de tiaj organizoj ne rajtas tiel agi, ke ili ĉirkaŭŝutos la impreson ke ili parolas en la nomo de la tuta movado. Tiel agante, ili malutilus al unu movado (la priesperanta) kiu estas al ili egale kara; ĉar ili emus forpeli de Esperantigo ĉiujn kies kredo sur alia kampo malsimilas al ilia. Similaĵo povas esti dirata pri agado ekster ĉiu organizo. Se iu Esperantisto estas samtempe socialisto, aŭ vegetarano, aŭ pacifisto, aŭ ŝovinisto, aŭ ateisto, aŭ katolika kristano, aŭ alispeca fervorulo por ia ajn religia sistemo, tiu havas private plenan rajton uzi, ne nur la gepatran lingvon sed ankaŭ Esperanton por argumenti favore al sia socialismo, vegetaranismo, paci-fismo, ŝovinismo, ateismo, aŭ religia kredo, ktp. Sed tion li rajtas fari nur kiel sendependa aganto, kaj devas neniel konfuzi -- por si mem aŭ por ceteruloj -- sian privatan kredon kun la komuna kredo kaj agado kiuj kuntenas ĉiuspecajn Esperantistojn en komuna laboro por Esperanto.

* * * * *

* OUR OFFICE HAS RECEIVED a few copies of a handsomely illustrated booklet of 54 pages which refers to the history of the Brazilian City "San Salvador de Bahia" and the principal sights and buildings in the city. This is an official publication of one department of the Brazilian federal government, the "Division of Statistics and Information." The introduction and the explanatory text accompanying the pictures are in Esperanto.

* LA nuna eldono de "Urbo Salvador", en Esperanto, estas dediĉata de la Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko al la Dua Interamerika Kongreso de Komunumoj, kunvenanta en Santiago de Ĉilio. Temas pri verko organizita kaj eldonita, primitive, en portugala lingvo de unu el la plej gravaj komunumaj departementoj de la Instituto, nome la Divizio de Statistiko kaj Propagando el la Magistrato de Salvador, ĉefurbo de ŝtato Bahia, kiu celis doni, per tiu rimedo, al ĉiuj, kiuj ne konas tiun ĉefurbon, viglan impreson pri ĝiaj historiaj tradicioj kaj pri ĝia moderna progreso. Reeldonante tiun ĉi verkon la Instituto elmontras sian ŝaton al la membroj de la Kongreso kaj propagandas ĉi tiu aron da utilaj informoj pri la brazila urbo, kie estis la unua sidejo de la ĝenerala registaro, kaj kiu tiel gravan rolon ludadis en diversaj fazoj de la nacia historia evoluado. Tion reliefigis la klera historiisto Profeso Pedro Calmon en la antaŭparolo de tiu broŝuro. Pri la idiomo elektita por tiu ĉi speciala eldono, oni devas klarigi, ke en la jaro 1938a la Instituto akceptis Esperanton kiel helplingvon por siaj aktivecoj kaj publikigaĵoj kaj poste ĝin metis en la programon de la Perfektiĝa Kurso, kiun ĝi kreis por la statistika oficistaro.

* * * * *

* AMERICAN POCKET DICTIONARY (just off the press) The author--Karl Froding--determined to improve on all other small dictionaries--others used "roots" only, and you added the rest; Karl used the whole word. You'll like it. It fits the pocket and the purse. Only 25 cents. EANA

* * * * *

NEW YORK TIMES
NOVEMBER 7, 1941.

MAX TALMEY DIES; EYE SPECIALIST, 72

He Gained National Acclaim in
Field for Cataract Removals
—Stricken in Home Here

WAS EINSTEIN'S MENTOR

He Interested the Scientist in
Mathematics—Was Leader
in Furthering Esperanto

Dr. Max Talmeý, ophthalmologist, prominent cataract surgeon and a boyhood friend of Professor Albert Einstein, died last night after an illness of two months at his home, 838 West End Avenue. His age was 72.

Dr. Talmeý's work in the field of the cataract received national acclaim in the medical world. On several occasions he performed successful operations.

In New York Dr. Talmeý joined the staff at Mount Sinai Hospital as ophthalmologist. In 1908 he became the focal point of attention in medical circles through what had been considered an "impossible" cataract operation on a 23-year-old youth. Eight years later he was called upon to perform another similar "miracle" and was again successful.

Theory on Infantile Paralysis

More than twelve years ago he conceived the then extraordinary idea that there was some connection between tonsillitis and infantile paralysis. He pursued this theory for years and it recently has received the serious attention of leading pathologists.

Dr. Talmeý claimed to be the first to introduce Esperanto to this country and wrote an English textbook on the subject.

It took from all great languages their most concise and expressive phrases.

The paths of Dr. Talmeý and Dr. Einstein again converged in later years and it was through this later association that Dr. Talmeý became interested in the Einstein theory and conceived the hope of making it comprehensible to the average person. Dr. Talmeý wrote several books on psychiatric subjects.

He leaves a widow, Mrs. Helen Buff Talmeý, and two children, Frieda Talmeý and Mrs. Frederick T. Paine. His first wife, Minnie Bythner Talmeý died in 1914.

THE HONOR ROLL--PATRONOJ KAJ SUBTENANTOJ--WILL BE PUBLISHED IN THE January issue. Patrono pays \$10.00, which includes EANA membership and Amerika Esperantisto for one year from date on receipt card. Subtenanto pays \$5.00--includes EANA membership and Amerika Esperantisto one year. Coming into this Patrono-Subtenanto circle gets you an extra blessing from a perpetually harassed treasury. VENU!!!

ESPERANTO NE SAME DANGERA POR ĈIUJ GERMAN-OKUPITAJ LANDOJ!...!!
"Ni atentigas niajn legantojn je tio ke oni povas skribi al ni en la lingvo Esperanto el ĝiu lando, ĉar la germana milita cenzuro tralasas la Esperanto-lingvajn korespondaĵojn. Efektive ni ricevas ĝiutage Esperantolingvajn leterojn kaj poŝtkartojn el Usono, Svedujo, Italujo, Hungarujo, kaj aliaj landoj," (El "Parolilo"-Denmark)

HERE IS EASY MONEY. The Esperanto Association of North America offers 24 prizes in order as follows: \$10; \$5; \$3; \$2; 5th to 24th \$1 each for the best last line to the following Limerick:
Esperanto's the language for me,
When writing to friends over sea,
It sure is a winner
For both saint and sinner



Make your last line rhyme with the first two lines. Send as many entries as you wish. With each entry send 10c, coin, for "ESTU PRETA" the key to Esperanto, which is a dictionary of the most common words, grammatical rules., of Esperanto, the International Auxiliary Language. Contest closes with the postmark of January 31, 1942. The winners will be announced in the Bulletin of February or March. Address: "ESPERANTO" 20 W. Washington St., Oklahoma City, Okla.

MAKES A HIT IN THE CENTRAL OFFICE. The Esperanto Association of LIMA, Ohio. (who so royally entertained the EANA 1940 Congress) sent in to Central Office not only the names of new officers for next year, but also the names of ten new members for EANA—with check. This is one of the VERY FEW clubs in which all the officers are members of EANA--and they are good ones. VIVU ESPERANTO KAJ LIMA!

E D Z I Ĝ O
F I S H E R -- O S O S K Y .
La 3lan de Aŭgusto
En Meadville, Pa., U.S.A.
Conrad Fisher kun Irene
Osoosky. Ambaŭ fervoraj
Esperantistoj. Gratulojn
kaj bondezirojn!

"ITS AS GOOD TO GIVE AS TO RECEIVE"
"What will I give?"

A subscription to a favorite magazine will be a periodical reminder of you. Ask Leahy for Special Rates on your list—for any magazine.

OR
A photograph—your friends cannot buy that at the store. Also

1942 ESPERANTO CALENDAR
is now off the press.
Size 3 1/2 X 9 inches.
5c for 1, 10c for 4.
Order from Central Off.

**Nur du lingvojn lernu tu,
Kaj ne pensu pri la tria:
Estu unu de ' Patruj',
De ' homar' estu ' alia!**
Ismael Gomes Braga

EDINBURGH DICTIONARY
we have just received half a dozen. 75 cents P p.

"A Picture is Worth 1000 Words"
POSTAGE STAMP PHOTOGRAPHS
Perforated and Gummed
Ready to Stick to Anything
THEY ARE INDIVIDUAL, UNIQUE
AND HOLD ATTENTION.
A Photograph attached to a letter gives it personality.
100—\$1. 500—\$4. 1000—\$7.
25 PHOTOS \$1.00 50 \$1.25
SATISFACTION GUARANTEED
WE WILL SEND YOU perfect copies from any size photo or snapshot, beautifully finished on genuine heavy weight photo paper, at above prices, postage paid, and original returned unharmed.
Have a good photo to send friends, relatives, correspondents, or prospective employer.
Used extensively by both college, and high school teachers and students. Very use extensive request
Size 1 1/2 x 2 1/2

For either of the above "Good Things" write Leahy, 1410 H St., Washington.

THE BOOK RENTAL SERVICE ENLARGED, AND NOW THROWN OPEN TO ALL. Our October No.

announced, on an experimental basis, the establishment of a service through the mails for rental of Esperanto literary books. If such a service could be widely taken advantage of by North American Esperantists it would be specially useful under present conditions when travel and world trade are so much disrupted. The original announcement in October included one rule to the effect that persons using the Rental Service must also register in the "Esperanto-Rondo de Librolegantoj." Since it is now known that there is no likelihood of any over rush of registrants for the Rental Service, it seems best to dispense with the rule above mentioned.

All Esperantists are therefore now cordially invited to rent whatever books they may care to read -- if contained in the published lists -- upon simple deposit of \$2.50 as a guarantee. A deduction against this deposit will be made for each book borrowed -- 15 cents up to four weeks for the larger books (300 to 500 pages) and 10 cents for smaller books (below 300 pages.) Balance of deposit returnable when further use of the rental service is not desired.

This matter is handled not through the IAMA central office, but directly by correspondence to the following address: E.G.Dodge,
1471 Irving St., N.W.,
Washington, D.C.

Consult your October number for the preliminary list of books set aside to be available for you through the Rental Service. In addition to the 33 works announced in that former issue, the following supplementary list is now announced so as to give you a wider range of choice.

Larger Books (300 to 500 pages.)

Kastelo de Prelongo (1907, first original Esperanto romance.) Dr. Vallienne.
Fatala Ŝuldo, by Lionel Delsace, (1910, translated from the French.)
Per Balono al la Poluso, illustrated. (Authentic account of Andre expedition.)
Plena Gramatiko de Esperanto, new edition. (Kalocsay & Waringhien.)

Smaller Books (83 to 300 pages.)

Hamleto (Shakespeare.) Translated by Dr. Zamenhof, 1894.
Parizaj Paroladoj de Abdul Baha. (Translated by Miss Lidia Zamenhof.)
"Espero Internacia." (Christian hymns, translated by Miss Ann E. Beatty.)
Naciismo (E. Lanti.) Historical discussion of nationality from SAT viewpoint.
"En Rusujo per Esperanto." (A. Rivier.) Samideanoj in Czarist Russia about 1911.
Dancu Marionetoj! (Original by Julio Baghy.)
La Mistero de l' Sango. (Concerns science of heredity, translated from German.)
Elektitaj Noveloj de Lu Sin. (Translated from the Chinese.)
La Sorĉistino de Kastilo (by Salom Asch.) Translated from the Yiddish.
Patroj kaj Filoj (from the Russian by Turgenev.) Translated by Kabe.
Aspazio (tragedy in five acts.) Translated from Polish, by Leon Zamenhof.
Dante's "Infero." (Translated by Kalocsay, retaining original verse form.)
Progresado kaj la Pasinteco. (Social analysis of history.) Translated from English book of George Frederick Wates.
Princo Serebrjanij. (Translated from Russian of Alekseo Tolstoj.)
Padlo Debenham. (Original romance in Esperanto, by H.A. Luyken.)
The Odyssey (Homer.) Complete prose translation by W.J.A. Manders.
Gustav Vasa (by Reinhold Schmidt-Gotha.) The first original drama in Esperanto. Historical drama, 1910.

In respect to the matter of reading, let it never be forgotten that he who uses Esperanto is the Esperantist in the highest sense. And especially during the great present disturbance from war, reading is the one use of Esperanto most available to all.

ESPERANTO EN NATAL

Natal — "la kajo de Eŭropo", tiel alnomata pro sia proksimeco de la malnova kontinento — laboras modelinde kaj imitinde por nia movado.

Dank' al la klopodadoj de "Esperanta Asocio de Rio-Grande-do-Norte" ("Associação Potiguar de Esperanto"), nia internacia lingvo estas tie sufiĉe diskonigata. La gazetaro ofte aperigas poresperantajn artikolojn, esperanto-kursoj funkcias dufoje semajne ĉe sidejoj de la asocio, la ĉefaj librovendejoj ekspozicias gravajn librojn en kaj pri Esperanto, ktp.

La vesperjurnalo "O Diário" publikigas regule ĉiusabate esperanto-fakon titolitan "Esperanto & Esperantismo", kiun direktas la entuziasmema samideano Arlindo Castôr de Lîma, unua sekretario de "Associação Potiguar de Esperanto".

En la pasinta jaro, A. P. E. festis solene la naskiĝa datreveno de nia Majstro, 15.XII.40an. La oficialan paroladon faris d-ro Gentil Fernandes, fervora esperantisto, kiu venis el sia urbo Areja-Branca speciale por tiu ĉelo. Lia parolado vere inspirigita meritis varmajn aplaŭdojn de la granda ĉeestantaro.

Antaŭ kelkaj semajnoj, la nuna prezidanto de A. P. E., s-ro Jerônimo dos Santos, malfermis "fraŭlinan kurson", en la kvartalo Alecrim, la plej loĝantplena kvartalo en tiu ĉefurbo. Enskribiĝis dektri fraŭlinoj, kiuj sin montras tre entuziasmitaj kaj ĵus organizis inan grupon titolitan "Lidja Zamenhof Esperantistina Grupo". La nova grupo filiĝis al "Esperanta Asocio de Rio-Grande-do-Norte". "Associação Potiguar de Esperanto" aliĝis al "Brazila Ligo Esperantista" kaj "Internacia Esperanto Ligo".

A. P. E., fondita je 28.IX.1940, deziras interŝanĝi esperantistojn kaj korespondantojn kun gesamideanoj de ĉiuj nacioj. Adreso por korespondado: Rua Presidente Passos, 566 — NATAL — R. G. Norte — Brazilo.

Al la bravaj kaj laboremaj geesperantistoj de Natal, niajn plej korajn gratulojn kaj niajn kuragiĝajn stimulojn!

"O Brasil Esperantista" M. S. C. NEKROLOGO

El la diversaj eksterlandaj esperantistoj mortintaj lasttempe ni devas citi s-ron Edward A. Milidge, la tre konatan Akademianon, kiu mortis kun la aĝo de 75 jaroj. Li naskiĝis la 12-an de Julio 1965a en Vingeton-on-Thames kaj edukiĝis en Portsmouth School. Li estis membro de B. E. A. Lia ĉefa verko estas Esperanto-English Dictionary, jam en ĝia sesa eldono. Ni sendas kondolencojn al lia familio. O Brasil Esperantista

WE HAVE JUST RECEIVED the September-October issue of the "Esperanto Internacia" official organ of the International Esperanto-Ligo. This No. is of more than ordinary interest because of the news it carries about continuing Esperanto activities in many countries, including some where it would hardly be expected of the overshadowing storm cloud of the war. There are long and short items of news from Britain, North and South America, Egypt, New Zealand, Australia, Denmark, Japan, China, Norway, Sweden, Finland, Hong Kong, France, Netherlands, Portugal and Manchukuo. Every active Esperantist in addition to supporting EANA by his membership, ought to encourage the International Esperanto-Ligo in this critical time by being a full individual member. Membership in the IEL is counted by the calendar year--beginning January 1st, so the time is close at hand when the dues for 1942 should be transmitted. Combination prices with EANA dues: EANA membership with American Esperantist and IEL membership, with Jarlibro \$2.75--with Esperanto-Internacia added, total \$3.75. All dues should be sent to Esperanto Association of North America, 1410 H St., N-W, Washington, D.C.



ONE OF THE MOST POPULAR CHRISTMAS CARDS in Esperantujo. Same size as above: 2 for 5c, 12 for 25c. Postcard size 5c, 7 for 25c. E.A.N.A.

S-ano August Bretscher c/o EANA, 1410 H St., N-W., Washington, D.C. Deziras korespondadi kun Esperantistinoj, leteroj postkartoje ktp. Norda kaj Suda Ameriko..


KUNPREMANTAJ MANOJ

Antaŭ malmulte ni havis la plezuron persone rilatiĝi kun s-ano prof. Charles E. Simon, vicprezidanto de la Esperanto Asocio de Nord-Ameriko, kiam li libertempis en Meksiko. Li estis kontenta en nia urbo, k'afable kvalifikis ĝian panoramon je "eta paradizo". El letero kiun li poste nin skribis, ni elĉerpas gravan paragrafon:

Mi ŝatus pensi ke la amikecoj kaj interrilatoj de mia vizito en Meksiko estos nur la unua paŝo al plena kooperado inter la Esperantistoj de via lando kaj de la mia. Ni estas nombre malmultaj, sed per niaj komunaj klopodoj, ni povus montri al nekredanta mondo la valoron de nia lingvo kaj movado. Eble baldaŭ ni vidos vere internaciajn kongresojn de la tutamerikaj Esperantistoj, kinter ili la usonanoj k' meksikaj devos preni gvidantan rolon. Eble eĉ ĉe nia venonta kongreso de la Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko ni povos gastigi tie ĉi ambasadorojn de la malmultnombra sed tre bonkvalita Esperantistaro de nia najbara lando.

(El "Renovigo")

Miss Doris Tappan and Uncle George A. Connor, are as usual, constantly advancing the cause of Esperanto. They have FOUR classes now going strong. THE IMITINDA



ALWAYS WEAR THE GREEN STAR, the Esperanto emblem. One at left, green background, golden E and ball point protectors. Screw back fastening 40c, Safety catch for the ladies 50c. This emblem was made to sell for \$1, but not being "moneymad" (only somewhat anxious) we are willing to divide with hoped-for wearers, sell for above prices. One on the right is a real novelty, made by the Kiowa Indians of Oklahoma. All beads on leather back, with safety catch for 35c. E.A.N.A., 1410 H St., N-W, Washington, D.C.

leather